

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRÉSIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS	6, rue de Mézières	75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX	55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov.	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT	26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON	7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE	12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES
C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto		2324 93 N. ROUEN

==== la m<sup>o</sup>: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotiza: 7 F. Sumo: 30 F. ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

==== N<sup>o</sup> 160 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== MARTO 1989 ====

## ===== BILETO DE LA PREZIDANTO =====

Il est nécessaire de fixer de temps en temps notre regard sur les buts et sur l'avenir du mouvement auquel nous adhérons. Il nous faut définir à nouveau nos prochains objectifs, réveiller notre volonté et définir la voie que nous suivrons pour progresser; notre prochain congrès doit nous en donner l'occasion.

Nous voulons introduire, dans les milieux chrétiens de tous pays, une langue de communication commune, nécessaire pour la pratique des relations universelles, besoin essentiel de notre temps, moyen privilégié de rapprocher les esprits et les cœurs.

En un siècle d'existence, l'Espéranto a démontré en de nombreuses manifestations son aptitude à mettre en communion des hommes de multiples langues et cultures. Mais il a fallu, et il faudra encore longtemps recourir à de nombreux militants désintéressés pour que soient reconnus les progrès considérables qu'on peut en attendre. Si, dans les grandes instances internationales, la nécessité d'une langue commune est profondément ressenti, les langues nationales "majoritaires" prétendent s'imposer aux dépens des autres... L'Espéranto possède toutes les qualités attendues d'une langue de communication, dans le respect de toutes les particularités régionales ou nationales.

Nous devons soutenir tous les efforts faits pour l'introduction de cette langue dans l'enseignement officiel, comme apporter notre aide aux initiatives individuelles. Il faut surtout atteindre les milieux jeunes, capables de se passionner pour que des relations amicales, ainsi rendues possibles, s'établissent sur une vaste échelle.

Nous la voyons, cette jeunesse, dans les milieux chrétiens, manifester sa foi, au-delà des préjugés nationaux, aimant à se rencontrer, venant de tous horizons, comme récemment sur l'invitation de la communauté de Taizé à Notre-Dame de Paris, comme, il y a quelques mois à Rome, comme de nombreux mouvements spirituels pour prier ensemble, animés d'un même élan spirituel pour la paix,

.. / ...

la kooperacion des peuples, la protection de la vie et de la nature, le respect de l' homme.

Tel mouvement de jeunes chretiens prevoit pour ses rencontres internationales en 1989 de mettre en contact plus de 50 pays, dont 1/4 des pays de l' est; quels fructueux echanges permettrait l' usage d' une langue commune!

Lors de notre assemblee de Nevers, nous vous proposons de reflechir ensemble aux moyens a mettre en oeuvre pour elargir notre cercle, pour penetrer les milieux des nouvelles generations, promouvoir un effort pour l' enseignement, la pratique et le developpement de la langue au service d' un monde appele a devenir plus solidaire dans la vie de foi, comme dans les rapports de societe.

R. C. I. COLAS

RESUMO

Ni alrigardu la celon de nia movado, por pripensi la estonton de nia asocio. Vekiĝu niaj voloĝ, firmiĝu niaj klopodoj; estu nia venonta kunveno en Nevers la okazo por prepari la vojon al novaj progresoj.

Ni celas enigi ĉe la kristanajn mediojn lingvon por-la praktiko de la ĉiam pli necesaj rilatoj, ilon de proksimiĝo de la mensoj, de la spiritoj kaj de la koroj.

Esperanto, en centjara praktiko, elpruvis sian kapablon por realigi tian rolon. Kiel la grandaj internaciaj instancoj, la kristanaj movadoj sentas la neceson de helplingvo komuna al ĉiuj, sed ne progresas en tia vojo, ĉar la "ĉefaj" naciaj lingvoj pretendas al superregado super la aliaj. Vere neŭtrala lingvo estas la sola solvo.

Ni devas subteni ĉiujn klopodojn por la disvastigo de Esperanto en ĉiujn mediojn, precipe ĉe la junaj. Inter la kristanoj, ni vidas movadojn, kiuj kunigas gejunulojn eĥ multaj landoj, en grandaj manifestacioj, ĉu el Eŭropo, ĉu el la tuta mondo. En komuna preĝo, en komunaj interŝanĝoj, la novaj generacioj sin preparas por la konstruado de la estonto, paco, kunvivado inter la popoloj, respekto de la vivo kaj de la naturo, homaj rajtoj.

Al tiuj mankas fundamenta rimedo: la ebleco uzi komunan lingvon, por vere komuniki kaj sin frate interkompreni. Nur la vigla laboro de niaj fervoraj samcelanoj povos prepari la estonton, aligi junajn elementojn en niajn rondojn, por la disvolviĝo de nia lingvo, je la servo de nia kredo en pli frata mondo.

R. C. I.

+++++

PREĜO, FASTO KAJ DISPARTIGO

Fratoj, estas tri agoj en kiuj staras fido, konsistas pieco, daŭras virto: preĝo, fasto kaj dispartigo. Preĝo pordfrapas, fasto kaj mizerikordo ricevas. Preĝo, mizerikordo, fasto, tiuj tri fariĝas unu kaj donas vivon al si reciproke.

Fasto ja estas la animo de la preĝo, mizerikordo estas la vivo de la fasto. Neniu dividi ilin; la tri ne povas apartiĝi unu de la aliaj. Kiu praktikas nur unu aŭ du, tiu havas nenion. De, kiu preĝas, tiu devas fasti. Kiu fastas, tiu devas pardoni. Ni aŭskultu la petanton, ĉar tiu ĉi deziras esti aŭskultata. Kiu ne rifuzas aŭskulti, kiam oni petegas lin, tiu estas aŭdata de Dio.

Kiu fastas, tiu estas komprenonta la faston. Li estas simpatianta kun la malsatanto, se li volas, ke Dio simpatiu kun lia propra malsato. Kiu esperas ricevi mizerikordon, tiu estu pardononta... De preĝo, mizerikordo, fasto devas formi unusolan patronadon por rekomendi nin al Dio, unusolan pledon favore al ni, unusolan preĝon favore al ni laŭ triobla formo.

S-ta Petro Krizologo, 5-a jarcento

+++++

SVISA INTERNACIA RADIO

Dum multaj jaroj la elsendoj de SIR okazis ja la 18.30, sed ekde la 6-a de novembro 1988, ĝi ili okazas je la 14.30 (eŭropa tempo), kiam la plimulto estas en la profesia laboro. Tiam ŝanĝon necesigis la adapto en la strukturo de la nova 9-lingva programo de SIR.

Bonvolu skribi al: SIR, Esperanto-fako, CH-3000 BERN Svislando. Se vi petos ĝin, vi ricevos la senpagan programon.







FAMILIAJ NOVAĴOJ

La familia rondo de nia kara prezidanto pligrandiĝis per ĝemela triopo, kiun donacis al li lia filino Catherine. La etuloj, Clément, Marie kaj Samuel naskiĝis la 7-an de novembro 1988. Koman bonvenon al ili. Langan kaj feliĉan vivon ili havu!

Inter miaj fidelaj anoj, perdiĝis:

- 1) S-ino HUBERT Thérèse. Lasta konata adres: 46, Bd Carnot 80000 AMIENS
- 2) F-ino STAS Armande, kiu loĝis 1, rue Baudinot 71120 CHAROLLES.

Se iu konas ilian novan adreson, bonvolu informi S-inon Vincent.

RECENZOJ

- 1) LITOVIO HODIAU. Vilnius eldonejo Mintis. 1988. 86 p. 125 x 198. Havebla ĉe U.E.A.

Tiu bele presita, en bona Esperanto verkita libreto donas ekvidon unue al la ĉi-jarcenta historio de Litovio, al ties ekonomio, scienca progreso, lingvo, artoj kaj arkitekturo. Agrabligas ĝin du noveloj, bildoj pri modo kaj infandeseĝnaĵoj, pri folkloro kaj bestoj. Ne mankas receptoj pri litovas manĝoj kaj ĥumuraj karikaturoj. Unu paĝon la kompilantoj dediĉis al tutjara litova Esperanto-agado. Rekomendinda legaĵo ĉefe al tiuj, kiuj scivolas pri la vivo en la baltaj respublikoj.

- 2) KANTIĴARO, kompilita de Roger BERNARD kaj Roger DEGRELLE. Eld. FKEA. 1976 + aldono 1987. Ĝi entenas 88 kantikojn por la diversaj mespartoj kaj liturgiaj eventoj, kaj la koncernajn muziknotojn. Prezo: 50 F frankite. Eblas havi nur la aldono 1987 por kompletigi sian kantikaron.

Mendu de S-ino Vincent 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE.

LA DEK ORDONOJ DE DIO

- 1. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.
- 2. Ne faru al vi idolon, nek bildon de io; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin.
- 3. Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.
- 4. Memoru pri la tago ripoza, ke vi tenu ĝin sankta.
- 5. Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero.
- 6. Ne mortigu.
- 7. Ne adultu.
- 8. Ne ŝtelu.
- 9. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.
- 10. Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian serviston, nek lian servistinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

Laŭ Eliro 20:3-17, el folio eld. 1960

Sveda sekcio de K.E.L.I.

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

La Konservantaro de la IFL, Kataluna Esperanto-Asocio, Kooperativo de Literatura Foiro kaj Muzeo de Esperanto en Sant Pau Ordal invitas la ĉiulingvajn esperantistojn geverkistojn konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia trobadora festo de la 29-aj IFL en 1989.

La verkojn oni sendu, po ĉe ekz., ĝis la 30-a de aprilo 1989 al la sekretario: Joan Ramon Guinon i Roset, Carrer Vilamari 106-108 baixos interior segona E-08015 BARCELONA Katalunio Hispanujo.

Pliajn informojn povas doni S-ino Vincent.

KOLOMBO, SIMBOLO DE PACO ( daŭrigo)

Tagoj pasis. Vetero ree plivarmiĝis. Du etaj birdidoj, antaŭe nur flavaj lanugaj, iom post iom kovniĝis per grizaj plumetrj.

Foje mi ekdeziris iomete karesi la bravan birdinon. Dume ŝi reciproke ekbatis min per sia beko kaj flugilparo - solaj armiloj, kiujn ŝi posedis. Se ŝi povus paroli, ŝi certe ne uzus eĉ tion, ŝi eble dirus: "He, vizinaĉo, mi tute ne bezonas vian laŭdon, mi faris ja nenion eksterordinaran, lasu min en trankvilo!"

Kiam la birdoj estis jam dusemajnaj, la gepatroj lasis ilin dumtage solaajn. Matene la patrino nutris ilin per paneroj, vespere alflugadis por kovri ilin kontraŭ nokta malvarmo. En la neŝto dumtage mastris nur etaj gefratoj. Foje mi provis ilin ektuŝi kaj spertis la saman batalon flanké de la kolombido. Du semajna "viro" jam scipovis protekti sian fratinton kontraŭ malamiko. Per siaj beko-kaj flugiloj li batis mian manon tiel forte, ke mi rememoru por ĉiam, kion signifas vera gefrata amo.

Foje komenciĝis vespere fortega pluvo. La nubo venis tiel rapide, ke mi me havis tempon pripensi, kien kaŝi la birdidojn. La akvo verŝiĝis rekte en ilian neston. Ili dume ne povis forflugi, ili sidis pacience sur malpuraĵoj esperante, ke tio nepre baldaŭ ĉesos. Pluvego vere ĉesis. Mi trovis ie paperan skatoletan, enmetis iom da papercetoj kaj kaŭriĝis tien la malsekajn kolombidojn. Ekŝajnis al mi, ke en seka kaj pura nesteto estos por ili multe pli oportune. Sed, ho ve, mi eraris! Post kelkaj minutoj, ili ree sidis sur la malsekaj malpuraĵoj. La nesto elektita de la gepatroj estis por ili ne anstataŭebla. "Ne gravas, ke tiu nesto estas malseka, ne gravas, ke ĝi malbonodoras, sed ĝi ja estas propra. Por kio al ni tiu lukso? Ni volas nenium riĉaĵon. Ni loĝas ĉi tie tre mallonge, ni baldaŭ fonflugos." Ŝajnas, ke ĝuste tiuj pensoj regis tiunokte en la kapetoj de la kolombidoj.

O homoj, militemaj, primeditu! Ĉu vi ne sentas honton, organizante militirojn por akiri riĉaĵojn pli kaj pli grandajn? Ja ankaŭ nia vivo surtere similas al tiu de kolomboj en nesto portempa.

( daŭrigota)

+++++

NI PREGU  
=====

Por respondi al la peto de pluŝaj anoj, jen denove niaj ĉefaj preĝoj:

PATRO NIA

Pa tro nia, kiu estas en la ĉielo,  
sanktigata estu via nomo, venu via regno,  
fariĝu via volo, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero.  
Nian panon ĉiutage donu al ni hodiaŭ,  
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,  
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj,  
kaj ne konduku nin en tenton,  
sed liberu nin de la malbono,

ĉar via estas la regno, kaj la potenco kaj la gloro, eterne. AMEN.

SALUTON, MARIA

Saluton, Maria, gracoplena,  
La Sinjoro estas kun vi.  
Benata vi estas inter la virinoj,  
kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.

Sankta Maria, Dipatrino,  
preĝu por ni, pekuloj,  
nun kaj en la horo de nia morto. AMEN.

+++++

KASISTINA ANGULO

Multaj anoj perfekte komprenis la Zamenhofan proverbon aperintan sur p.6 de la decembra n° kaj akurate renovigis sian jaran kotizon. Gratulon kaj dankon al ili. Tamen, pli ol la DUONO (jes!) de niaj membroj ĝis hodiaŭ restis surdaj. Ili TUJ plenigu ĉekon, morgaŭ venos aliaj zorgoj, kaj vi ree forgesos. Atentu, ke la marta n° estos la lasta, kiun vi ricevos... se vi ne pagos.

HIMNO AL PACO ( Muziko de Beethoven, fino de la 9-a simfonio)

Amo pelos for la morton;	For malamon, ĉiuj venu!
Ne plu sango kaj mizer'.	Vivu amo, vivu ĝoj'!
Venkos ni malbelan sorton.	Ne landlimoj plu katenu,
kun milito kaj sufer'.	Ĉiam estu frata voj'.
Ĝojon por estuloj ĉiaj,	Sen ripozo kaj sen laco
Fidon al la homa spec'.	Fratoj, kun marŝu ni,
Revo de prapatroj niaj,	Por ke realiĝu paco,
Kaj morgaŭa realec'.	<del>Kaj morgaŭa realec'.</del> Tiel bela ambici'.
Nin muziko dia gvidas,	Estontec' por junularo,
Per ĝi batas ĉiu kor'.	Por laboro la komfort',
Ni unuanime fidas	De l' mizero jen la baro,
Al la fino de l' dolor'.	Jen feliĉ', jen paca sort'.

Tiun himnon ni intencas kanti en Nevers. Kunpartu ĝin.

XX

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

INSTRUKCIOJ POR LA VOĈDONADO: respondu la ĉi subajn demandojn forstrekante la senutilaĵojn, enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu ĉi tiun koverton en alian, kiun vi sendu al la sekretario, F-ino PREUX, antaŭ la 15-a de aprilo. Korse de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu alian aĵon, ĉar tiun koverton oni malfermos nur en Nevers, dum la kongreso!

XX

RAJTIGILO (sendata al F-ino Preux v.P.1)

Mi, subskribinto (noma kaj voknoma)

me povas partopreni la kongreson en Nevers kaj rajtigas reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de FKEA.

Antaŭ la subskribo, skribu Dato kaj subskribo:  
permane "Bon pour pouvoir"

XX

VOĈDONILO

1. Ĉu vi aprobas la laboron faritan de FKEA? JES NE SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la financon raporton? JES NE SINDETENO (1)
3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. (2)

P-ro DEGRELLE Roger	PONS Roger
F-to MARMOU René-Jean	VILLENEUVE Georges

- (1) Forstreku la senutilaĵojn.
- (2) Vi rajtas forstreki aŭ/kaj aldoni nomojn, kondiĉe, ke ne estu pli ol 4 nomoj en via listo.



ENHAVO

- |                                  |                             |
|----------------------------------|-----------------------------|
| 1.2. Bileto de la prezidanto     | 5. Familiaj novaĵoj         |
| 2. Preĝo, fasto kaj dispartigo   | Recenzoj                    |
| 3. Lingva angulo                 | La dek ordonaj de Dio       |
| Protokolo de la komitatkunveno   | 6. Kolombo, simbolo de paco |
| Programo de la kongreso          | Ni preĝu                    |
| 4. Por bone prepari la kongreson | Kacistina angulo            |
| Financa raporto                  | 7. Himno al paco            |
| Nia membraro                     | Rajtigilo kaj voĉdonilo     |

\*\*\*\*\*

KOTIZTABELO 1989

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 100 F  
 Peranto: P-ro Degrelle c. c. M. NANCY 2 555 38 L.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 30 F  
 Geedza paro 40 F  
 Infano ĝis 16-jara, mastro, religiul(in)o 15 F  
 Bonfaranto 150 F  
 Dumviva membro 600 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "Eo Actualités" 215 F  
 U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 225 F  
 Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

\*\*\*\*\*

Lastminute : Ne eblas alveni vendredon vespere en la kongresejon,  
 sed eblos resti ĝis mardo matene, 2-a de majo.

\*\*\*\*\*

Dépôt légal: 1er trimestre 1989 !! Polycopié par l' A.C.F.E.  
 C.P.P.A.P. n° 62 532. !! Prieuré St-Martin  
 Directeurs: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie  
 Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY  
 René-Jean Marmou !! FRANCE

\* \* \* \*